

Esperanto en servo de la monda paco

 **P A C O**

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)



Parto de la MEM-delegitaro en la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco.



VIVGRAVAJ PROBLEMOJ

La universala porpaca Parlamento de la Popoj certe estas la plej impona esprimo de la monda porpaca movado. Tiu originala forumo estis organizita en la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario kaj prezentas altan honorigon por la bulgara popolo fare de la pacbatalantoj el ĉiuj teranguloj pro la sinsekva kaj daŭra agado de la lando favore al la paco sur la Balkanoj, Eŭropo kaj en la mondo.

Oni faris grandajn klopodojn en la apartaj landoj por sukcesa aranĝo de la Parlamento. Temis ne nur pri ĝia realigo kiel monda pacforumo. Temis ĉefe pri ĉiulanda amasa preparlaboro jam antaŭ la kunvoko de la Parlamento en Sofio, por altiri al porpacaj aktivecoj novajn popoltavolojn, novajn sociajn fortojn — organizaĵojn, movadojn, grupojn kaj elstarajn personecojn. Ĉar kiel instruas la plej nova historio de la homaro, solida enradikiĝo de malstreĉeco en la politika kaj la milita sferoj povas realiĝi nur kun la energia subteno fare de vastegaj rondoj de la monda publika opinio. Ne sufiĉas nur la klopodoj de sobre pensantaj politikistoj kaj registaroj. Estas ege necesa amasa subteno al iliaj porpacaj agadoj fare de la popoloj. Tiuokaze eĉ plej konservativaj kaj militemaj politikistoj kaj generaloj estos devigitaj ŝanĝi sian praktikan politikon kaj subiĝi volenevole al la postuloj de siaj popoloj kaj de la monda publika opinio.

Du mil personoj el pli ol 130 landoj kaj 100 internaciaj organizaĵoj (inkluzive Mondpacan Esperantistan Movadon) partoprenis tiun altan pacforumon. Ĉiuj delegitoj estis elektitaj de landaj organizaĵoj kaj movadoj defende al la paco, de internaciaj kaj regionaj neregistaraj organizaĵoj — virinaj, junularaj, sindikataj ka., de politikaj partioj kaj movadoj, de landaj parlamentoj kaj aliaj elektataj organoj, de laborkollektivoj en fabrikoj kaj oficejoj, de kulturaj kaj edukaj institutoj, de religiaj kaj sociaj rondoj, inter elstaraj personoj, kiuj per sia plumo kaj praktika gado faris konsiderindan kontribuon por la interkompreniĝo kaj bonfarto de la popoloj.

Jen kio donis rajton nomi tute normale tiun internacian pacforumon „Porpaca Popolparlamento“. Ja laŭ sia reprezenteco, elekto kaj konsisto de la delegitaroj, laŭ la ekskluziva graveco de la diskutitaj problemoj kaj la aprobitaj decidoj la popolparlamento pravigas sian nomon kaj esprimas la volon de la popoloj defende al la paco.

Dum la lasta jardeko oni havis eblecon kompari la sobran kaj utilan al ĉiuj popoloj politikon de

sereniĝo, paca kunekzistado kaj malarmado kun la aventurista politiko de planado de „limigita nuklearmila milito“, deklarita de la usonaj militaristoj kaj konkretigita de la fama „Direktivo No 59“ de la usona prezidento. La publika opinio en Usono kaj en diversaj aliaj landoj (inkluzive aliancajn al Usono) esprimis egan malkontenton lige kun tiu cinika dokumento. Solidaj, tute ne maldekstraj, ĵurnaloj en Japanio, Usono, Federacia Respubliko Germanio, Italio ka. sin deklaris kontraŭ tiu freneza ideo. Ili tute prave kaj argumentite pruvas, ke ekde la unua momento simila „limigita“ nuklearmila milito transformiĝos en mondan nuklean katastrofon. La ege sopirata de la usonaj militaristoj revo pri limigita nur en Eŭropo nuklea milito, por ke Usono restu ĵlanke de tiu „limigita“ infero, estas fantaziaĵo kaj iluzio celanta alkiutimigi la popolamasojn al kvazaŭ neevitebla monda milito. Al simila aventurista „ideo“ kun kantas per raŭka voĉo ankaŭ la strategoj el Pekino. Malantaŭ la dorsoj de similaj miopaj politikistoj kaj generaloj sin kaŝas la transkontinentaj korporacioj produktantaj amasdetruajn armilojn kaj zorgantaj nur pri siaj ŝabeldimensiaj egoistaj profitoj.

En nia epoko la unusola racia vojo de la internacia politiko estas la decida sinturno al paca traktado de la disputproblemoj inter la interesitaj ŝtatoj kaj en la koncernaj organoj de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UNO). Rilate la problemon de la malarmado validas la rekomendoj de la speciala sesio de UNO. Jen la aktualaj taskoj starantaj antaŭ ĉiuj popoloj. Devo de la gvidantoj de grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj estas la realigo en la praktika vivo de simila politiko — la ununura reala kaj racia alternativo de tria mondmilito.

Tial en la centro de la laboro de la Parlamento estis „La tuttergloba armado kaj la militminaco, la monda batalo por malarmado kaj sereniĝo“. Oni traktis ankaŭ la batalon de la noveliberiĝintaj landoj por nacia kaj ekonomia sendependeco, por sociala progreso. Estis diskutitaj ankaŭ novaj pli efektivaj formoj de batalo kontraŭ la rasismo kaj la koloniismo, kontraŭ la apartismo, por pliŝortigo kaj evoluigo de la solidareco kun popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko batalantaj kontraŭ la imperiismo kaj neokoloniismo. Pri ĉiuj menciitaj temoj estis formulitaj klaraj kaj saĝaj dokumentoj de la Parlamento.

Cu eblas la praktika realigo de la aprobitaj dokumentoj? Cu entute estas ebla la savo de la homaro de la katastrofaj postsekvoj de la aventurista usona politiko? ▶



Bulgario

DELEGITARO DE MEM

En la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco MEM estis reprezentita de kvinmembra delegitaro konsistanta el:

Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM;
D-ro Imre Pethes — prezidanto de MEM;
William Gilbert — ĝenerala sekretario de MEM;
Violin Oljanov — ĉefredaktoro de „Paco“ kaj membro de la sekretariato de MEM;
Dimitr Haĝiev — prezidanto de la bulgara MEM-komitato.

La delegitoj partoprenis en la laboro de diversaj sekcioj de la Parlamento. Gravan rekonon al la rolo de MEM en la ĝenerala pacbatalo prezentas la elekto de ĝiaj gvidantoj kiel membroj de la Monda Packonsilantaro. Niaj reprezentantoj en ĝi estas: **d-ro Imre Pethes kaj William Gilbert**.
Niajn gratulojn al la elektitoj!

Sofio. Okaze de la laboroj de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco la bulgara MEM-komitato kaj la urba estraro de BEA aranĝis la 24-an de septembro j. k. grandan packunvenon de la tuturba esperantistaro, kiun ĉeestis pli ol 200 personoj. Gravaj gastoj de la kunveno estis: la sekretario de la Monda Packonsilio D-ro Károly Laukò, la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes kaj la ĝenerala sekretario de MEM William Gilbert.

La honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev malfermis la kunvenon kun enkondukaj vortoj

En nia epoko la reala interrilato de la militarismaj kaj porpacaj fortoj estas favora por la pacbatalo. Kiel ideologie, tiel ankaŭ materiale, la pacfortoj en monda skalo disponas pri grandegaj eblecoj malebligi la agadon de la aventuristoj en la politiko. Por tio tamen estas absolute necesa pli efika ol ĝis nun mobilizado de novaj sociaj tavoloj pretaj decide kadukigi la planojn de la aventuristoj pri nova puŝo al la armado.

Malkapablaj solvi pozitive la problemojn de senlaboreco, inflacio kaj ekonomia malprogreso de la okcidenta mondo, la usonaj kaj alilandaj aventuristoj serĉas elirvojon en danĝera sfero de la vetarmado kaj preparo de nuklearmila milito.

En tiu komplikita internacia atmosfero la Parlamento diris sian senkompromisan „Ne!“ al la

pri la celoj de MEM. Li donis la parolon unue al d-ro Laukò, kiu salutis la kunvenantojn kun bondeziro pri fruktodona laboro. Li emfazis la gravan rolon, kiun povas ludi Esperanto kiel ponto inter la popoloj.

La prezidanto de MEM I. Pethes rakontis pri la aktuala agado de MEM kaj pri la respondeca rolo de la MEM-delegitaro en la laboro de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco. Li esprimis dankon al la prezidanto de MPK Romeŝ Ĉandra pro la akcepto de kvinmembra delegitaro de MEM en la Parlamento.

La ĝenerala sekretario de MEM W. Gilbert salutis en la nomo de la Federacio de la Esperantistoj-Laboristoj en Francio, kiu subtenas MEM kaj kunlaboras.

La prezidanto Pethes kroĉis la honorinsignon de MEM al la sekretario de MPK Károly Laukò, al Ĥristo Gorov — prezidanto de BEA, Ĥristo Manolov — MEM-aktivulo, kiu jardekojn utiligas Esperanton en la batalo por paco, Dimitro Haĝiev — prezidanto de la bulgara MEM-komitato, Zahari Ivanov — vicprezidanto de la bulgara MEM-komitato.

La kunveno akceptis deklaron, per kiu ĝi esprimas sian apogon al la laboro de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco kaj profundan esperon, ke ĝi estos grava kontribuo en la penado de la popoloj forigi la pendantan danĝeron de nuklea milito kaj la militon ĝenerale por ĉiam, ĉesigi la frenezan armadkonkuradon kaj la monstran malŝparadon de homaj fortoj kaj de rimedoj por neniigo de la vivo.

Post la oficiala parto estis prezentita riĉa arta programo.

O.



Svedio

MEM-KUNVENO EN STOKHOLMO

En la kadro de la 65-a UK de Esperanto okazis MEM-kunveno. Ĝin partoprenis pli ol 100 personoj. Ĝin prezidis Magomet Isaev, sciencisto, prezidanto de la Asocio de la Sovetiaj Esperan

senbrida vetarmado, por esti konservita kaj stabiligita la paco sur nia planedo. La samaj fortoj de la homaro daŭre sekvas tiun vojon kaj venos al la fina venko super la nigraj fortoj de la imperiisma milito.

La sinceraj streboj de ĉiuj esperantistoj al paco, amikeco kaj interkompreniĝo de la popoloj mirinde koincidas kun la decidoj de la Parlamento. Ni, MEM-anoj, abnegacie laboretas por ties nepre realigi!

Nikola Aleksiev
honora prezidanto de MEM

tistoj. La prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes raportis pri la monda politika situacio kaj la taskoj de MEM.

La ĉefredaktoro de gazeto „Paco“ Violin Oljanov atentigis pri la rolo, kiun ludas la organo de MEM kaj pri la bezono organizi pli vastan kampanjon por varbado de abonantoj.

Pluraj pacbatalantoj esprimis sian starpunkton pri la starigitaj demandoj. Oni emfazis la neceson de pliaktiviĝo en la batalo kontraŭ la provoj pri intensigo de la malvarma milito, kontraŭ la vetarmado, por sereniĝo kaj trankvila vivo.

La kunveno unuanime akceptis jenan

REZOLUCION

La partoprenantoj:

— aprobas la raporton de la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario de MEM;

— konstatas, ke en la nuntempa monda situacio estas necese pli bone mobilizi la esperantistaron por la agado de MEM uzante la eblecon de la internacia lingvo;

— subteras ĉiujn paŝojn de internaciaj organizoj por daŭrigi la traktadojn pri la malararmado, por plena realigo de la decidoj de la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo;

— komisias al la estraro de MEM serĉi eblecon pri partopreno de MEM-delegitaroj en internaciaj aranĝoj, pliakтивigi la mondan movadon de pacbatalantoj por konservo de la paco.

USSR

PORPACAJ ARANĜOJ

De la 28-a de julio ĝis la 17-a de aŭgusto 1980 en la Siberia urbo Krasnojarsk okazis la 22-a Orientsovetia Esperanto-Junulara Tendaro. Ĝin organizis la Krasnojarska E-klubo sub la aŭspicio kaj kun subvencioj de la Krasnojarskaj urba kaj subdistrikta komsomolaj komitatoj kaj de la Kulturpalaco. En la programo de la tendaro estis jam tradiciiginta E-universitato, paroligaj kursoj, seminarioj de E-aktivuloj kaj instruistoj, belartaj kaj sportaj konkursoj.

Granda atento estis dediĉita al porpaca kaj internaciisma aktiveco de la E-kluboj. La partoprenintoj rakontis pri organizado de MEM-sekcioj en sovetaj respublikoj (Armenio, Uzbekio, k. a.), kunlaboro de E-kluboj kun lokaj pacdefendaj komitatoj, okazigo de porpaca ekspozicioj kaj prelegoj (Rostov-Don, Samarkand, Tjumen, Krasnojarsk k. a.).

La SEJT-anoj organizis bonvolan labortagon, kiun partoprenis ĉ. 200 tendaranoj el 54 loĝlokoj de USSR kaj kies plena profito estis transdonita al la Sovetia Pacfonduso.

La labortago finiĝis per amasa mitingo okaze de la 35-a datreveno de l'atombomboj super Hiroŝima kaj Nagasaki, en kiu la partoprenantoj akceptis jenan

ALVOKON AL LA ESPERANTISTARO DE LA TUTA MONDO:

Ni, partoprenantoj en la 22-a Esperantista Junulara Tendaro de Siberio kaj Malproksima Oriento, estas maltrankviligitaj pro la komplikiĝo de la internacia situacio, kaŭzita de aventuraj agoj de la usona Carter-administracio. Ni bone scias, kio okazis antaŭ 35 jaroj en Hiroŝima kaj Nagasaki kaj alvokas la esperantistojn de la tuta mondo firme elpaŝi kontraŭ renovigo de vetarmado.

Ni ne permesu ripetigon de la tragedio de Hiroŝima kaj Nagasaki!

Ne — al la neŭtrona bombo!

(Sekvas 124 subskriboj)

Honora membro de UEA

En siaj dumkongresaj kunsidoj la Komitato de la Universala Esperanto Asocio en Stokholmo decidis deklari la honoran prezidanton de MEM **NIKOLA ALEKSIEV honora membro de UEA**. Tio estis anoncita en la solena ferma kunsido de la 65-a Universala Kongreso.

La redakcio de „Paco“ kore gratulas nian pacamikon kaj membron de la Redakta Komitato Nikola Aleksiev pro tiu alta rekoro fare de la monda esperantistaro.



ekumena VOĈO de paco

Francio. Renkontiĝo de eŭropaj kristanoj kun kristanoj el Latina Ameriko okazis fine de aprilo 1980 en la Domo de katolika agado en Parizo. Partoprenis ĝin kristanoj el 10 eŭropaj landoj kaj el 5 latinamerikaj. La fakprelegintoj analizis jenajn temojn:

— ekonomiaj kaj politikaj problemoj en landoj de la Latina Ameriko;

— stato de la eklezio en la Latina Ameriko, kiu subtenas batalon de la loĝantaro por sociala justeco;

— situacio de la katolika eklezio en la eŭropaj socialismaj ŝtatoj, kie estas respektata religia libereco kaj religianoj partoprenas konstruadon de socialismo.

ĈSSR. En montaro Altaj Tatroj okazis en tagoj de 20—21. 5. 1980. teologia seminario, pritraktanta aktualajn problemojn de la nuna homaro, kiun partoprenis profesoroj de la teologia publiko. La traktado estis dediĉita al problemaro de la sociala evoluo ĝis la fino de la dua jarmilo, Tiu ĉi tempospaco devas fariĝi epoko de paco, politika malstreĉiĝo, likvidado de armado, kiu estas neigo de la etikaj principoj.

Francio. En majo 1980 okazis en Bordeaux 3-taga kongreso de Franca laborista katolika agado (ACO) — omaĝe al 30-jara jubileo de ĝia fondiĝo. Partoprenis ĝin 1000 delegitoj, kiuj kritikis la malfavoran, daŭre malplibonigantan situacion de la franca laboristaro. Ĉeestis eĉ prezidanto de la laborista komisiono de la franca episkoparo, episkopo Mons. Herbulot el Essonne, kiu kondamnis antikomunisman kaj lige kun la laboristaj postuloj proklamis: „Vivi supozas havi materialan bazon por vivo.“

Usono. En Chicago okazis plenkunsido de episkopoj el USA, instiginta prezidenton J. Carter realigi modernigitan politikon kaj trovi politikan solvon de la malakordiĝo kun Irano.

Venezuelo. La ĝenerala sekretario de la Venezuelana episkopa konferenco mons. Ovidio Perez Morales, eldonis en la ĉefurbo Caracas gravan proklamon. En ĝi estas akcentite, ke la katolika pastraro ne estas apatia al suferado de la latinamerika popolo, sed ke ĝi subtenas penojn de justaj socialaj ŝanĝoj en la lando. La proklamo konkludas, ke ĝiaj pensoj ne estas motivataj de politikaj vidpunktoj, sed fontas el mesaĝo de

Jezuo Kristo. Ĝuste pro tio ĝi celas pacon, socialan justecon kaj ĉiuflanke plenharmonian vivon.

Argentino. Episkopoj de Argentino postulas de la registaro, ke ĝi senprokraste klarigu la sorton de miloj da malaperintaj civitanoj kaj instigas demokratigi Argentinon.

Salvadoro. La posteulo de la murdita San-Salvadora episkopo O. A. Romero — nova administratoro Arturo Rivera — instigis en sia prediko la regantan junton, ke ĝi finu la politikan perforton kaj ebligu starigi vere demokratian registaron, en kiu estus reprezentitaj ĉiuj opoziciaj fortoj.

GDR. En Dresdeno okazis en la tagoj de 18—20. 6. 1980 la VIIa kunsido de la Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj (BK), kiun partoprenis 240 katolikaj kristanoj — episkopoj, pastroj, eĉ laikoj — el 24 eŭropaj landoj kaj aliaj kontinentoj.

La centran temon „20 jarojn ĝis jaro 2000. En respondecu antaŭ Dio kaj homoj — plifortigi agadon por malstreĉiĝo malarmado kaj paco!“ disvolvis — de teologia vidpunkto — portugala dominikano Louis de Franca per referaĵo „Evoluo kaj kontinueco de la mondo — daŭra alvoko“, — per politika argumentado — deputito de la pola seĝmo Witold Jankowski en referaĵo „Kunekzistado anstataŭ konfrontado — ordono de la epoko“.

Usono. Helpfonduson por Salvadoro kun komenca mondepono 10 000 US-dolaroj fondis „Katolika helpservo“ en Novjorko. Ĝi estis kreita honore al la murdita episkopo. O. A. Romero kaj dediĉita al viktimoj de la eksterordinara situacio en Salvadoro. Iniciatinto de tiu ĉi fondaĵo episkopo E. B. Broderick proklamis: „Pro la kaoso en la lando ĉiam plej multe suferas la malriĉuloj. En Salvadoro estis silentigita ilia plej aŭdata parolinto, sed per nia fonduso eblos denove konstante aŭdi liajn vortojn, modifitajn en konkretaj helpagoj.“

J. K.



SPORTO ESTAS PACO

Impresoj pri Olimpikoj-80

*... Ho sporto, vi estas paco!
Dank' al vi la tutmonda junularo
edukiĝas estimi unu la alian.
Tiamaniere la varieco de la naciaj
kvalitoj estiĝas fonto de nobla
kaj para konkurado..."
(El „Odo al la sporto“ de Pierre
de Coubertain)*

Malgraŭ la bojkoto, deklarita de Usono kaj de kelkaj imperiismaj kaj antisocialismaj landoj al la XXII-aj olimpikoj en Moskvo — ili okazis! La justeco venkis la envion, la lumo venkis la obskuron! La paco venkis la malkonkordon!

Kolektiĝis en gastama Moskvo la elito de la tutmonda sporta junularo — 6000 sportistoj el 81 landoj, akompanataj de 1245 sportaj juĝistoj en 78 landoj. Krome — multaj ĵurnalistoj kaj pli ol 100 000 spektantoj.

Per la interŝtata televido la bulgara televido dum 182 horoj (po 11 horojn ĉiutagnokte) disaŭdigis kaj disvidigis plej interesajn momentojn en la nobla konkurado sur plej moderne ekipitaj sportaj stadionoj, basenoj, ŝcseoj, gimnastikiloj.

Guste unu monaton antaŭ la inaŭguro de la olimpikoj — la 19-an de junio 1980 tagmeze sur monto Olimpo en Grekio rekte el la sunradioj kolektitaj en granda konkava spegulo, estis bruligita la torĉo de la olimpia fajro — simbolo de paco, amikeco kaj konkordo inter ĉiuj popoloj. Surgenue prenis ĝin la unua torĉportanto kaj ekkuris laŭ la 4983-kilometrojn longa vojo Olimpo — Moskvo, akompanata de siaj asistantoj. Post ĉiu kilometro la torĉon prenis alia sporta ĉampiono. En ĉiu pli granda urbo de Grekio, Bulgario, Rumanio, Sovetunio okazis solenaĵoj kaj la fajro ekbrulis en grandaj metalaj kalikoj.

Post unu monato — la 19an de julio 1980 — lasta prenis ĝin la olimpika ĉampiono Sergej Belov, en stadiono „V. I. Lenin“ el Luĵniki apud Moskvo. Ritme, ne tro rapide kurante, li direktiĝis al la majesta kaliko, kun formo de lotuso, kun 7-metra diametro, sur kies ekstera flanko estis majstre gravuritaj la kvin diverskoloraj olimpikaj cirkloj. Silente observis la ceremonion pli ol 104 000 spektantoj en la stadiono. La sportisto genuis antaŭ la lotuso. Speciala mekanismo („kuranta vojo“) prenis la flamon de la torĉo kaj transportis ĝin en la grandegan kalikon. Majeste ekbrulis la 4-metrojn alta flamo. La horloĝo en la Kremla Turo sonis la kvaran. Dudek du blan-

kaj kolomboj alflugis al la blua ĉielo. La 5000 partoprenantoj en la „viva fono“ skribis la devizon: citius — altius — fortius (pli rapide — pli alte — pli forte). El la tribuno de oficialaj gastoj Leonid Iljiĉ Breĵnev deklaris la olimpikojn malfermitaj. Eksonis la olimpika himno. Ok sveltaj sovetaj ĉampionoj enportis la olimpikan standardon. En harmonie formitaj vicoj, laŭ alfabeto ordo, trairis la stadionon la sportaj delegitaroj de 81 landoj.

La solena malferma programo estas plenumata de 16 000 personoj — atletoj, gimnastikistoj, amatoroj, infanoj. Aparte impresas la komplikaj ekzercoj de la plej junaj (9—11-jaraj) sportistoj, vestitaj kiel la ursido „Miŝka“. La publiko hipnotite eksilentas kiam cento da atletoj rapide kaj perfekte formas la kvin cirklojn kaj en ĉiu el ili — unu plurmetrojn altan piramidon, sur kies pinto, simile al birdoj, kiuj ne timas falon — akrobatas junulinoj.

La viva fono senĉese ŝanĝas bildojn kaj sloganojn. Aperas la terglobo, ruĝe brilas la ĉefurbo Moskvo, kaj al ĝi direktiĝas sportistoj. 3 600 artistoj kaj amatoroj el ĉiuj respublikoj plenumas folkloran programon „Suito de l'amikeco“. Al la ĉielo flugas 5 000 blankaj kolomboj. Jen la fono pentras la bonanime ridetantan ursidon Miŝka. — La urso, per kiu en Okcidento la televido timigas la infanojn — estis talismano de la Olimpiko kaj amata amiketo de ĉiuj.

Du semajnojn daŭris la amika kaj nobla konkurado. La sportistoj montris nekredablajn pintojn de sia majstreco. Plibonigitaj estis 74 olimpikaj, 36 mondaj kaj 39 eŭropaj rekordoj. Distribuitaj estis 203 komplektoj (609 pecoj) da medaloj pri 22 diversaj sportludoj. La unuajn tri lokojn okupis: USSR — 195 medaloj (80 oraj, 69 arĝentaj, 46 bronzaĵoj); GDR — 126 medaloj (47 oraj, 37 arĝentaj, 42 bronzaĵoj); Bulgario — 41 medaloj (8 oraj, 16 arĝentaj, 17 bronzaĵoj). Ĉe la Olimpikoj en Helsinko, 1952 j., Bulgario okupis la 42-an lokon! Ofte la difrenco inter la unuaj tri kaj la ilin sekvantaj estis tiel minimuma, ke la publiko ne povis eĉ percepti ĝin, nur la elektroj aparatoj ĝin fiksis.

Ordinare ĉe enmanigo de medaloj sonas la nacia himno kaj oni hisas la landstandardon de la ora medalisto. Dum la XXII Olmpikaj Ludoj okazis io bedaŭrinda, ĝis nun neniam okazinta, kaj — ni esperu — neniam plu okazonta! — Pro la bojkoto kaj malpermeso fare de la respektivaj registaroj, kiam oni enmanigis orajn medalojn al la ĉampionoj de Usono, Italio, Grand-Britio kaj de kelkaj aliaj landoj, sonis ne la nacia, sed la Olmpika himno, kaj oni hisis ne la nacian, sed la Olmpikan standardon, por granda ĉagreno de la sportistoj, videbla sur iliaj vizaĝoj. . . . Poste, en intervjuoj, ili esprimis sian bedaŭron pro tiu fakto.

Olimpikoj okazos ankaŭ estonte, rekordoj estos plibonigataj, solenaj artprogramoj estos plenumataj, sed certe nenie kaj neniam estos ripetitaj la grandiozaj programoj ĉe la inaŭguro kaj la fermo de la XXII-aj olimpikoj en Moskvo!

Estas la 3-a de aŭgusto 1980, 19.30 horo. Denove pli ol 104 000 spektantoj plene okupas la sidlokojn de la grandega stadiono „V. I. Lenin“ en Luĵniki apud Moskvo. Komenciĝas la ferma programo. Mi iom emocie pensas, ke ĝi estas valora donaco fare de la soveta popolo al senmorta Lenin, lige kun la 110-jariĝo de lia naskiĝo. . .

Fanfaro el 170 muzikistoj anoncas la fermon de la olimpikoj. La viva fono pentras la kvin cirklojn. Eble estus interese mencii kelkajn detalojn pri tiu „viva fono“. Ĝi konsistis el 5000 gejunuloj. Ĉiu el ili posedis ekipon konsistantan el 9 kolorflagetoj, 3 balonoj, 2 ventumiloj, 6 brusttukoj, 5 ĉapeloj, 5 partoj de komuna panelo. La podio estis elektrizita. La fonon estris Lev Nemĉik, staranta vid-al-vide, sub viziero, kun mikrofono enmane. Li sentis la kvinmilan amason kiel vivan organismon, kaj eĉ se nur unu eraris per la partoj de la ekipo, li tui nomis sektoron kaj vicon, kie tio okazis. La „larmoj“ de urvido Miŝka estis pentritaj de junuloj de la 56-a ĝis la 38-a vicoj. . . Dum la spektaklo la fono montris 174 bildojn kaj sloganojn!

El la kvar anguloj de la stadiono eliras po cent sveltaj junuloj, blanke vestitaj, kun ruĝaj standardoj enmane kaj lerte formas la emblemon de la Moskvaj olimpikoj.

Tricent gejunuloj en naciaj kostumoj majstre plenumas popoldancojn.

Kvin grupoj kun po cent junuloj portas standardojn kun la koloroj de ĉiuj kontinentoj.

Reprezenta grupo de 1080 sportistoj en blanka civila vesto, miksite (ne laŭ ŝtatoj, kiel ĉe la inaŭguro) marŝas, feliĉe ridetante, salute svingante per manoj.

Kaploke marŝas sportistoj portantaj la standardojn de Sovetunio, Grekio kaj Los-Anĝelos, mastro de la XXIII-aj olimpikoj en 1984.

Je la 20-a horo lordo Kilanin anoncas la fermon de la XXII-aj olimpikoj en Moskvo. Malrapide estingiĝas la Olimpika flamo kaj kliniĝas malsupren la olimpika standardo, sub la sonoj de la „Odo de Sporto“, plenumata de orkestro el 740 muzikistoj. Ok sveltaj junuloj malrapide marŝas, tenante la olimpikan standardon vertikale. La viva fono aperigas ĉielarkon. La kremla horloĝo sonas la dudekan horon. La fono prezentas la turon de Kremlo. Al la ĉielo flugas 22 blankaj kolomboj, kaj 22 kanonsalvoj pentras per iluminraketoj, mirinde belajn florojn sur la nokta Moskva ĉielo. Tridek akrobataj paroj plenumas komplikajn, la spiron retenantajn gimnastikajn figurojn. La fono rapide vidigas unu post la alia simbolojn kaj bildojn: serpo kaj martelo, kolombo, cigno, boato, kosma raketo kaj. . . jen denove aperas Miŝka, el kies okuloj fluas grandaj blankaj larmoj. . . Granda ĥoro plenumas solenan adiaŭan kanton, oni perceptas la vortojn: „. . . Olimpika fabelo, adiaŭ! . . .“ kaj „. . . Miŝka, ne ĉagreniĝu. . . ridetu por adiaŭ! . . .“ Kaj vere — sur la fono Miŝka jam ridetas, tenante grandan florbukedon. . .

Al la stadiono eliras granda „Matrjoŝka“ (nacistila rusa muntebla ligna pupo, pitoreske or-

namita). Ĝi ridetas, palpebrumas, riverencas laŭ rusa maniero. Poste ĝi disdubiĝas, el ĝi eliras dua, malpli granda, el ĝi — tria, ktp. — viciĝas kelkaj „matrjoŝka“-j, ĉiu faras la samajn movojn, poste rapide eniras unu en la alian, la dika granda matrjoŝka riverencas kaj malaperas. . .

Subite la bruanta publiko por momento eksilentas, hipnotite rigardas. . . kaj tuj denove laŭte kortuŝite ekridas, tondre ekaplaŭdas. . .

— Starante sur platveturilo eniras la stadionon ok metrojn alta Miŝka, kun dekoj da balonoj flirtantaj super ĝia kapo. Ĝi svingas la mallongajn antaŭajn piedojn, ridmienas. Poste ĝi prononcas per raŭka voĉo: „Karaj amikoj, nia festo finiĝis. Ĉion bonan!“ Kaj. . . Miŝka-kosmonaŭto leviĝas desur la platformo kaj malrapide forflugas al la nokta Moskva ĉielo adiaŭata de pli ol 104 000 paroj da homaj okuloj kaj mansvingoj. . . La publiko eligas profundan centmilgorĝan suspiron, kiam Miŝka ne plu estas videbla.

Pentrite denove de la fono, Miŝka kun larmoj en la okuloj ridetas kaj svingas florojn. . .

Finiĝis do la 16-taga festo de la monda sporta junularo. Ĝi estis festo ankaŭ por la miliardoj da televiziaj spektantoj en la mondo, kiuj ĝuis la nekredablajn rekordojn, la mirindan majstrecon kaj elegantecon de la malpeza atletiko (dekatlono). Ĉiuj atletoj prezentis sin tiel bone, ke la prezidanto de la Moskvaj Olimpikaj Ludoj Ignatij Novikov prave diris: „. . . La olimpikoj difinis siajn heroojn. Sed pli ĝuste estus diri: La ĉefa rezulto de la olimpikoj estas, ke ne ekzistas malgajnintoj. Venkis ĉiu el ni, venkis la tuta homaro!“

Sidante dum 16 tagoj antaŭ la televidilo, katenita de mia kormalsano, mi tamen nostalgie pensis: kiom pli facila kaj brila estus la etoso dum la olimpikoj ĝenerale, se ĉiuj sportistoj kaj spektantoj parolus ankaŭ en unu komuna lingvo — Esperanto! — la lingvo de tutmonda amikeco kaj paco!

Rajna Konstantinova

Sofio, aŭgusto, 1980



„Esploro“ de sovetaĵaj proponoj

Okaze de la 90-jara datreveno de naskiĝo de la eksa Prezidanto Ho Chi Minh, la Fremdlingva Eldonejo de Hanojo baldaŭ aperigos valoran broŝuron „Ho Chi Minh — Versaĵoj kaj Prozo“ en franca kaj en Esperanto. La redakcio de „Paco“ kun plezuro anoncas ĝin al siaj legantoj, kaj prezentas tie ĉi kelkajn erojn el la poeziaĵoj, en traduko de Dao Anh Kha.

SEN TITOLO

De longe versojn mi ne faris
 ĉi-foje provos unu tenti.
 Paperoj knaris, rimoj foris
 la rim' subite sonas: venki.
 1968

La ĉinaj ekspansiistoj plenintence kaj laŭplane detruis la groton de Pak Bo! Ĉu ili kredis, ke per tio ili sukcesus ekstermi Ho Chi Minh? Ho Chi Minh neniam estas eksternebla, li eterne vivas. La ĉinaj ekspansiistoj, la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj devas scii, ke Ho Chi Minh plu vivas en centoj da milionoj da homaj koroj amantaj Ho Chi Minh kaj Vjetnamion

Romesh Chandra

LA GROTO DE PAK BO

Tage ĉe la rojobordo, nokte al la grotoŝtupo
 kiel tagmenuo, bambuido kaj maiza supo,
 Sur ŝancela ŝtono la partian vivon mi tradukas,
 vere ne malmultajn ĉarmojn revoluciulo
 plukas.

Februaro 1941

ESKALADANTE LA MONTON

La dekkvaran de la sesa Lunmonato
 sur ĉi monto estas mia eskalado.
 Mi kaplevas: ardas ruĝe la sunpleno,
 Rojoborde: branĉ' prunuja en soleno,
 Lung Ze, 1942

PROFUNDA NOKTO

Murmur' de rojo klara kvazaŭ kant' lontana.
 old-arbo lunbanata, floro ombrobana.
 profunda ŝajnepentra nokt' la hom' ne dormas
 pro l'sorto patrolanda sola li maldormas,
 1947

ANONCO PRI VENKO

Demandas luno ĉe l'fenestro: Ĉu pretas la poem
 — Militaferojn nun mi zorgas, poste eblos
 rimi.

El turo sonoril' min vekas de l'aŭtun-revem',
 Jen venas de la fronto venk-anonco por sublimi.

1948

SEN TITOLO

Ne tiom olda ĉe la sepdek-oka mi min trovas.
 Sur miaj ŝultroj taskojn mi ankoraŭ porti povas,
 Pro l'ŝtato kaj popolo plensukcesas niaj devoj
 Antaŭen! Mi mem, je la paŝ' de niaj filoj,
 nepoj!

1968

PLENLUNO DE L'NOVJARO

Senlim' printempa sub lunluma ĉielvolbo
 ondadas akvo ĝis la blua firmamento,
 Flumeze ni diskutas pri l' militosolvo,
 Nokt-tarde. Plenas la sampano de arĝento.
 1948

FLUGFOLIO

ESTIGI FAJRON

Ja multe malfacilas la unua moment'
 kiam fajron oni provas estigi.
 Sufiĉas ke alvenu febla printempovent'
 La fajrero riskas ne plu efiki.
 En densa fum', vi blovekscitas, ventumadas,
 vi ŝirmas de ĉi flank', ĝi tremas de l'alia,
 Sed kiam bona fajro jam stabila statas
 plu vundas ĝin nek pluv', nek vent' defia.
 La flamon nur vigligas tikla maldika pluv'
 dum ĝin levadas des pli alten ventoforto.
 Ardiĝos montoj kaj arbaroj en flamdiluv'
 lumbrilos la ĉielo pro l' fajreskorto!

●
 Simile iras nia Revoluci'
 Plej akras ĉiam la unuaj paŝoj.
 Imperiistoj, reĝoj, mandarenoj — fi-kcluzi'
 per la spionoj, strebas al sabotoj, kraŝoj,
 Kondukos al fiasko nur manketo,
 suferi devojiĝo igos la popolon,
 Sed prenu plenkonscion, lanĉi la Revolucion,
 ĝi tuje en impeto
 kuntrenos la patrujon en fervorobolon.
 Ekflames ĝi, vulkan' majesta
 kaj muĝos kiel fluso oceana.
 Amasojn la enormajn en elan' protesta kaj
 tempesta
 ĝi levos disfrakase al la gento vulpa kaj ŝakala
 La deltojn, valojn kaj montarojn scintiligos
 ĉiu flamer'
 brilante sur standard' de sendependo kaj liber'!

Tiu ĉi poemo estis publikita en eksterleĝa ĵurnalo dum la lukto kontraŭ la japanoj kaj francoj antaŭ la Aŭgusta Revolucio de 1945.

Glosaro

eskalado — grimpo per ŝtupetaro

febla — malforta

fluso — altigo de la maro ĉe tajdo

koluzio — kondamninda interkonsento

lontana — malproksima

olda — maljuna

Pak Bo — kalka groto en la provinco Kao

Bank. Reveninte la landon post longa travivado en eksterlando, Ho Chi Minh loĝis

en tiu perdita angulo ĉe la landlimo por

efektivigi siajn revoluciajn aktivadojn. Tie

ĉi li tradukis la „Historion de la Komunista

Partio de USSR“ en la vjetnaman, je servo

por la kadroj.

rojo — rivereto

sampano — orientlanda boato

scintili — brileti

tarda — malfrua

zamenhof – de pacifisto al pacdefendanto

Canko Murgin

La homaro havas multmiljaran tradicion en militado. La organizita paclaboro estas historie tute nova fenomeno. Unue ĝi aperas en primitiva formo de pacifismo, sed poste estas perfektigita en pacdefendon.

La unuaj pacifismaj organizaĵoj estis fonditaj en la XIX-a jarcento, post la militoj de Napoleono: en Novjorko (1815), en Londono (1816), en Ĝenevo (1830) k.a. En 1843 estis organizita la unua internacia kongreso por paco (en Londono). Ĝin partoprenis nur angloj kaj usonanoj. En la periodo 1848—1851 estis organizataj ĉiujare vere internaciaj kongresoj de pacifismo: en Bruselo (1848), en Parizo (1849) en Frankfurto apud Majenco (1850) kaj en Londono (1851). La menciitan kongreson en Parizo prezidis la franca poeto kaj verkisto Viktoro Hugo. Tiam li diris la ofte cititan sentencon, ke tago venos, kiam en muzeo oni eksponos kanonon, same kiel oni nun eksponas turmentilojn kaj miras, ke ili vere povis esti uzataj.

En 1867 Frederiko Passi fondis la unuan internacian pacifistan unuigon sed poste ĝi transformiĝis al Societo por Arbitracio inter la Nacioj. Samtempe eminenta triopo, konsistanta el belga verkisto Lemonnier, Viktoro Hugo kaj itala nacirevoluciulo Garibaldi, fondis la „Internacian Ligon por Paco kaj Libereco“. Dum la franca-germana milito estis starigitaj landaj pacifismaj organizoj en Nederlando kaj Belgio kaj dum 1882—1883 — en Skandinavio (Danlando, Svedio kaj Norvegio) kaj kelkajn jarojn poste — en Germanio kaj Italio.

En 1889 (de 29-a ĝis 30-a de junio) dum la mond-ekspozicio en Parizo estis organizita impona kongreso de pacifismo, kiu poste estis oficiale rekonita kiel unua kaj plej grava. Ekde 1897 en daŭro de pli ol dek jaroj ili okazas regule ĉiujare. Ankaŭ inter la du mondmilitoj estis organizitaj tiaj internaciaj kongresoj de pacifismo.

La internacia kongreso de pacifismo en Parizo (1889) kaj la starigo de „Internacia Konstanta Pacifista Oficejo“ en Berlino (1891) inspiris L. Zamenhof verki sian konatan inter la esperantistaro poemon „La Espero“ (1891), kiu poste fariĝis himno de la ĝenerala E-movado.

La pacifisma doktrino pledas kontraŭ la uzado de armiloj por solvado de internaciaj kaj interklasaj problemoj. Tiu larĝa koncepto fakte similis al sakstrato ĉirkaŭita de altaj muroj kaj en la horizonto estis videbla nur peceto da blua ĉielo.

La kontraŭstaro de la pacifismo kontraŭ la konkerema apetito de imperiistoj rilate al aliaj

landoj kaj popoloj estas laŭdinda. Tamen la kontraŭstaro de pacifismo kontraŭ la noblaj streboj kaj penoj pri liberiĝo fare de la jam subigitaj nacioj kaj ekspluatataj popoltavoloj estas nepardoninda kaj ekstreme reakcia agado. La sinne-niiga manko de la pacifismo estas ĝia kontraŭstaro al la liberigaj militoj kaj revolucioj.

L. Zamenhof enportis la pac-ideon en la E-movadon ekde la komenco (1878—1891). Bedaŭrinde ankaŭ la esperantista pacifismo estiĝis same tiel senfrukta kaj erariga kiel la ĝenerala pacifismo. Kaj tamen L. Zamenhof estas konsiderata kiel la plej frua stariganto de la nuntempa pacdefendo esperantista, gvidata de MEM. Kvankam tiu problemo ankoraŭ ne estas esplorita sisteme, profunde kaj amplekse, tamen eĉ ĉe tia stato de la aferoj oni nun scias, ke L. Zamenhof ne restis por ĉiam „klasika“, pasiva adepto de pacifismo. Pri tio ekzistas pluraj argumentoj. El ili mi mencias nur unu. La nuntempa pacdefendo, kiu kontraŭas al maljustaj militoj kaj soci-reakciaj puĉoj, sed samtempe agnoskas la rajton de la subigitaj nacioj militi kaj de ekspluatitaj popoltavoloj revolucii kontraŭ la subpremantojn kaj ekspluatistojn por sia liberiĝo, ekzistas en memstaraj organizoj ĝenerale ekde fondiĝo de Monda Pac-Konsilio (1949) kaj speciale por esperantistoj ekde 1953. En la antaŭaj jardekoj la pacdefendo ekzistis paralele kun la pacifismo jen per elpaŝoj de unuopuloj, jen en formo de oficiale neorganizitaj grupoj, jen en agado de iuj politikaj partioj (ekz. la partio de bolŝevistoj en Rusio, gvidata de V. I. Lenin). Je ŝtata nivelo la pacdefendo ekzistas ekde la starigo de Soveta Rusio kaj pli-ampleksiĝis post la venko de socialismo en la landoj de reala socialismo. Al tiu pacdefenda politiko aliĝas ankaŭ iuj aliaj ŝtatoj, ekskolonioj de imperiismo.

L. Zamenhof estis unu inter tiuj unuopuloj, kiuj evoluigis de pacifismo al pacdefendo. Tio okazis sub la influo de leninismaj ideoj dum la kontraŭimperiisma revolucio en Rusio (1905—1907). Same kiel la pacdefendantoj, L. Zamenhof trovis manieron publike demonstri, ke jam scipovas diferencigi la maljustan disde la justa kaj liberiga milito kaj revolucio. Rimarkinda estas la fakto, ke li ne nur ne kontraŭis, sed eĉ per vorteto ne riproĉis kontraŭ la ribelintaj laboristoj kaj kamparanoj, soldatoj kaj intelektuloj dum la unua rusa revolucio (1905—1907).

Eĉ pli, en sia kongresparolado (Ĝenevo, 1906) li raportis pri tiu evento sobre kaj kun simpatio: „Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milio-

Anakronisma teorio kaj nebulaj etimologioj

Nuntempe furoras la literatura ĝenro nomata fantaziscienco aŭ sciencfikcio. En Paco (1980/1, p. 8—10) oni povas legi ekzemplon de unu el ĝiaj branĉoj, la fantazilingvistiko. Temas pri la artikolo „Lingvo — natura fenomeno“ de André Cherpillod. Se mi estus leginta tiun verkon en periodaĵo eldonita en 1780 aŭ eĉ en 1880, mi ne tro surpriziĝus pri la prezentado de tia tezo eĉ en altnivela kultura revuo. Sed nun, en la jaro 1980, la lingvistiko estas evoluinta, matura scienco. Ĝi jam senbalastigis sin je pluraj falsaj hipotezoj kaj ĥimeraj teorioj. Unu el tiuj koncernas ĝuste la elmodiĝintan vidpunkton pri la naturo de la homa lingvo, kiun la aŭtoro de la citita artikolo provas disvastigi hodiaŭ. Eĉ laika leganto, zorge kaj atente sekvante la rezonadon de s-ro Cherpillod, ne povas ne rimarki, ke li ne citas la nomon aŭ verkon de eĉ unu nuntempe konata lingvisto, kiu dividas kun li la koncepton, ke la lingvo ne estas konvencio, sed estas natura fenomeno. Por trovi apoganton de tiu anakronisma teorio, la aŭtoro reiras en la historion ducent jarojn por elterigi la filozofion de Jean-Jacques Rousseau. Cetere, li elsorĉas mistikan nocion pri „la profundaj radikoj de la lingvo“ kaj spekulativas pri la parolkapablo de prahomedoj kiel la nomo de Neandertalo kaj la aŭstralopiteko.

Ne povante bazi sian tezon sur la aktualaj reserĉlaboroj de iu moderna skolo de la lingvoscienco, s-ro Cherpillod sekvas la piedspurojn de fruaj esploristoj en la tagiĝaj jaroj de la lingvistiko, kiam unu el la fantaziaj celoj de la nova scienco estis serĉi kunligojn inter ĉiuj lingvoj en la mondo. La metodo uzata tiucele estas,

noj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo.“ Ĉio ĉi indikas, ke L. Zamenhof rompis ideo la ŝelon de klasika pacifismo, eliris el ĝi kaj faris gigantan paŝon antaŭen en la estontecon. . . al nia epoko.

Jen estas la sekreto, kiu malŝlosis al ni la respondon al la demando:

Kial la nuntempaj esperantistaj pacdefendantoj sentas proksime al si la pactestamenton de L. Zamenhof?

por eviti pli fortan esprimon, naiva: oni kolektas vortojn aŭ morfemojn de la plej diversaj lingvoj, kiuj supraĵe similas semantike kaj fonetike. Ĉar lingvoscienculoj nun neas la interparencecon de ĉiuj homaj lingvoj, la imagkapbla aŭtoro argumentas, ke la simileco ekzistas en radikoj, kiuj estas „profundaj“, t. e. naturaj, kaj pro tio „devigaj“. Nur tiel homoj povas interkompreniĝi. Li emfaze neas, ke tiaj radikoj estiĝis tutsimple kiel rezulto de konvencio inter parolantoj.

La kerno de la teorio estas, ke certaj vortoj intersimilas en vasta nombro da dise parolataj lingvoj, ĝuste ĉar ili estas „naturaj“ vortoj; ili montras la devigan manieron esprimi la koncepton. Cititaj estas vortoj por „patrino“ kaj „patro“ kaj la personaj pronomoj „mi“ kaj „ci“. Marteladante tiun punkton, s-ro Cherpillod konkludas jene:

“Ĉu konvencio? Neeble! Aŭ ĉu la aztekoj plagiatas la birmanojn, aŭ Inverse? Stulte! Oni devas rekoni, ke popoloj tre diversaj, tre malproksimaj unu de alia, sen interrilatoj, elektis *nature* similajn sonojn por nomi similajn aĵojn aŭ konceptojn. Oni devas rekoni, ke ĉia ideo de konvencio estas senelira fabelo, rekoni, ke la lingvoj estas naturaj fenomenoj.” (p. 10)

Nu, lingvistoj jam delonge sciis pri tiuj similecoj, sed ili ne klarigas ilin per la fantazilingvistika nocio de „naturaj sonoj“. Fiziologoj kaj fonetikistoj, ekzamenante la parolorganojn de la homo dum la diversaj stadioj de lia kresko malkovris, ke certaj sonoj estas pli facile elparolataj ol aliaj; alivorte, la kapablo fari ilin estiĝas pli frue. Ekzemple, ĉiu infano, kiam ĝi komencas paroli, povas prononci labialajn kaj dentalajn sonojn, kaj pro tio, vortoj tre frue bezonataj kiel „patrino“ kaj „patro“, „mi“ kaj „ci“ enhavas tiujn sonojn. Sed ne ĉiuj vortoj havas ilin. Kial s-ro Cherpillod ne faris komparon inter la vortoj por „frato“ kaj „fratino“, du aliaj anoj de la primitiva homa familio? Li devis silenti pri tiuj kaj miloj da aliaj vortoj, ĉar ili ne apogas lian antikviĝintan teorion pri la natura origino de la lingvo.

Subtenado mankas ankaŭ por la neortodoksaj etimologioj, kiujn s-ro Cherpillod proponas, ĉefe rilate la praetimojn de la Esperantaj vortoj „nubo“, „nebul“, „nobla“ kaj „nobelo“. Li volas kredigi jenon:

„. . . ni jam trovos similecon inter la rusa „nebo“ (ĉielo) kaj la Esperanta „nubo“, kaj ankaŭ, „nebul“ Tio pruvas, ke okazis oftaj ŝanĝoj de senco. En antikva epoko, vasta grupo da homoj, aŭ la tuto de la homoj, mi ne scias, kutimis nomi *nebh* tion, kio estis alte super iliaj kapoj. . .“

„. . . la primitiva radiko *nebh* difinas ion *altan*; tial, eble ne estas hazardo, se ni retrovas la saman sonon en *nobelo*, el la latina *nobilis*, vorto, per kiu oni difinas la homojn de *alta* haskiĝo. Oni povas rebati, ke la etimologiaj vortaroj ne konsentas pri parenceco inter *nubo* kaj *nobelo*, aŭ ke tio estas nura hazardo. Ĝuste la mankojn de la etimologiaj vortaroj mi volas montri.” (p. 8).

Ne fidante la etimologiajn vortarojn, la aŭtoro de tiu citaĵo preferas funkciigi sian imagpovon kaj spekulativi pri parenceco inter „nubo“ kaj

„nobelo“. Tute alimaniere pensas lingvistoj kaj filologoj, kies kapoj ne estas en la nuboj. Manke de vera scienca etimologia vortaro de Esperanto, estas necese utiligi konsultlibrojn en pluraj etnolingvoj. Ni nun ekzameniu la historion de la cititaj vortoj.

„Nubo“ estas Fundamenta vorto, uzata de Zamenhof en Universala Vortaro. La etimologia vortaro de Louis Bastien montras, ke ĝi similas pleje al la latinida vorto *nube* (itala, hispana) kaj la latina *nubes, nubis*, kiu probable estas ĝia etimo. En la latina lingvo *nubes* havas kvar signifojn: (1) nubo; (2) amaso, aro; (3) malĝojo, tristo; (4) vualo, kovrilo. Ankaŭ „nebulo“ estas Fundamenta kaj devenas de la latina *nebula*, signifanta „vaporo“, „nebulo“, „fumo“, „nubo“. Ĝi estas parenca al la helena *nephele* kaj *nephos*, „nubo, nebulo, densa aro“. *Nephos* donas al Esperanto scienca pseŭdoprefikson „nef-“, kiu aperas en vortoj kiel „nefometro“ kaj „nefoskopo“, meteorologiaj instrumentoj por la observado de nuboj. Parencaj vortoj en la slavaj lingvoj estas la rusa *nebo*, pola *niebo* kaj ĉeĥa *nebe*, signifantaj ne „nubo“, sed „ĉielo“. En la germana lingvo *Nebel* (nebulo), estas la parenca formo. En aliaj germanaj lingvoj, la oldnorvega *nifl*- kaj la anglosaksa *nifol* signifas „malheleco“. La sanskrita parenca vorto *nábhas* signifas, krom „nebulo“ kaj „nubo“, ankaŭ „vaporo“ kaj „humideco“. La praradiko *nebh* ne signifas „io alta“, kiel s-ro Cherpillod erare asertas, sed „krevi, eksplodi, elflui, elfonti“.

„Nobelo“ kaj ĝia ĝemela radiko „nobla“ devenas de la latina „nobilis“, adjektivo kun la sekvaj signifoj: (1) konata, rekonebla; (2) fama, misfama, notora; (3) nobla, nobela, eminenta, elstara, bonega. La latina frazo *vetus et nobilis gladiator* signifas „malnova kaj fama gladiatoro“, ne „nobla aŭ nobela gladiatoro“. Pruvo, ke la baza signifo de *nobilis* temas pri konateco kaj fameco estas ĝia deveno de la verbo *noscere*, „koni, ekkoni, rekoni, scii“.

Estas, do, sensencaĵo doni al la praradikoj de „nubo“ kaj „nobelo“ la signifon „io alta“. La nocio de alteco tute ne rolas en iliaj signifoj. La vortoj por nubo havas kromsignifon de malheleco kaj malsekeco, dum nobelo fundamente estis konata aŭ fama persono. Nur poste tiu ĉi vorto alprenis la signifon de altrangeco. Por pruvi unu fojon por ĉiam, ke la etimologia metodologio de la fantazilingvistika skolo valoras nenion, mi citos ankoraŭ unu vorton parenca al „nebulo“, la latinan *nebulo, nebulonis*. Ĝi devenas de la latina *nebula* kaj signifas „fripono, ĉarlatano, sentaŭgulo“ — ĝuste la kontraŭon de „nobelo“ aŭ „nobla persono“!

Science bazitaj etimologioj alportas informojn pri vortuzo kaj signifoj utilajn ne nur por esploroj de etnolingvoj, sed ankaŭ de Esperanto. Pro tio, granda manko en la faka biblioteko de esperantologoj estas kompleta etimologia vortaro, kiu spuras la historion de vortoj en nia lingvo kaj registras la tujajn kaj praajn etimojn.

Ru kaj Katrin Bcssong

Nederlando

en kubo

(Vojaĝnotoj)

La unua aspekto pri Kubo estas, ke la stratoj estas tre puraj (multe pli puraj ol la stratoj kie ajn en Nederlando!), ke la homoj aspektas modeste, sed bone vestitaj, ke la virinoj estas ofte sufiĉe bunte vestitaj kaj ofte estas eĉ pli dikaj ol en Nederlando, kaj ke precipe la infanoj bonege kaj fiere aspektas en siaj lernejoj kostumoj kun ruĝa kravato. La koloro de ilia jupo aŭ pantalono varias laŭ la lernejo, kiun ili frekventas.

Alveninte en Havana, ni tuj serĉis telefonan kontakton kun kuba esperantisto, kun kiu ni antaŭe havis perleteran kontakton kaj laŭ kies peto ni kaj kelkaj geamikoj en nia vojaĝgrupo estis kunportintaj multajn esp. librojn, konsistantajn el vortaroj, lernolibroj kaj bonaj kaj modernaj romanoj, kiujn malavare disponigis al ni UEA, kiam oni aŭdis, ke ni intencas viziti la landon. Niaj kubaj amikoj eksaltis pro ĝojo, kiam ili vidis la amason da libroj de ni kunportitaj. Dum ĉiuj tagoj pasigitaj en Havana ni daŭre havis kontakton kun la tieaj esperantistoj, kiuj preskaŭ ĉiuj tre bone regis la lingvon. Niaj kubaj amikoj diris al ni, ke nuntempe regas en la lando tre granda interesiĝo pri Esperanto, la kursoj estas amase vizitataj. En februaro ĉijare oni malfermis kursojn ĉie en la lando kun duoble tiom da kursanoj kiom la antaŭan jaron. Reveninte en Havana post nia 11-taga aŭtobusa ekskurso tra la lando, ni tenis en nia hotelo Esp. konferencon, en kiu partoprenis, escepte kelkajn junajn homojn, ĉiuj niaj kunvojaĝantoj, eĉ nia grupgvidantino, kiu perfekte regis la hispanan lingvon. Ĉeestis la konferencon kvar kubaj esperantistoj. Ĉiu ne-esperantisto rajtis demandi al la kubanoj kion ajn, pri la lando, la sociaj cirkonstancoj, la ordinara vivo, la politiko. Ni rolis kiel interpretistoj kaj la afrero dum 2 1/2 da horoj bonege marŝis, eĉ tiel, ke niaj kunvojaĝantoj opiniis, ke tiu vespero estis unu el la plej bonaj kaj plej informriĉaj, kiujn ni havis en Kubo. Pri tiu ĉi konferenco jam raportis „Heroldo“ kaj — se ni bone rememoras — ankaŭ „Esperanto“.

Per klimatizita aŭtobuso ni faris 2500 km-an ekskurson tra la lando dum 11 tagoj, en kiuj ni vizitis urbojn, vilaĝojn, privatajn domojn, fabrikojn, sukerkanajn kampojn, pioniran vilaĝon kaj eĉ akuŝejon. Krom nia vojaĝgvidistino, kelkaj de nia grupo iom parolis la hispanan lingvon. Eĉ ekster la kubaj esperantistoj ni havis multajn

kontaktojn kun la popolo. Ili vere estas tre ĉarmaj kaj afablaj homoj kun granda kormalfermiteco kaj kun granda gastamo. Pro tio ni estis plurfoje en privataj domoj, kie ni klopodis „paroli“ kun ili, kio ĝenerale iom sukcesis per manoj kaj piedoj kaj pere de vortaretoj. Tiam ni estis regalitaj per bonega kafo kaj eĉ per rumo.

Kvankam Kubo estas evolulando, tie jam ne ekzistas mizero kiel en preskaŭ ĉiuj aliaj tiaj landoj. Estas evidente, ke la popolo atingis multegon per sia revolucio. Multo tamen ankoraŭ mankas. Nun la homoj havas tiajn esencajn aferojn por homeca vivo kiaj laboro, domo, medicina prizorgado (senpaga), instruado (senpaga). Pri tio oni despli konsciiĝas kiam oni vizitas ekz. la muzeon „Abel Santa Maria“ en Santiago aŭ la muzeon pri Alfabetigo en Havana. Abel Santa Maria estis tre bona amiko de Fidel Castro, kiu en 1953 estis terurege kaj ĝismorte torturita (elpiko de la okuloj, fortranĉo de la seksorganoj). En la muzeo, nomita je lia nomo, oni montras per amaso da fotoj la senfinan mizeregon, al kiu la popolo estis submetita dum la Batista epoko. Batista fine fuĝis al Usono kunpreninte la tutan kuban trezorejon. Sama bandito nomita Somoza de Nikaragvo cetere agis same pasintjare kaj estis frate akceptita en Usono.

Ankaŭ la Muzeo pri la Alfabetigo en Havana estis interesege. Kun multe da fotoj de tiu kampanjo la muzeo montras la uzitajn metodojn, la malfacilaĵojn, kiujn oni devis venki, la materialon, kiun oni uzis. La muzeo disponas per centiloj da kortuŝaj unuaj leteroj, ĉu al Fidel mem, ĉu al la Kuba registaro, skribitaj de la homoj, kiuj lernis legi kaj skribi. Dum la kampanjo kiu okazis tuj post la usona invado sur Playa Girón 42 junaj instruantoj kaj 5 distriktgvidantoj de la kampanjo estis murditaj de CIA-agentoj nur pro tio, ke ili volis instrui al sia popolo legadon kaj skribadon. Per tiuj ĉi teruraj krimoj CIA kaj ĝiaj subtenantoj denove montris sian monstran vizageton.

Rimarkinda afero en Kubo estas ankaŭ la absoluta manko je persona kulto. Ni sukcesis vidi nur unu fojon la bildon de Fidel, kiu staris laŭ la vojo en historia loko, kie la dua kaj la tria frontoj de la gerilanoj renkontis unu la alian. Informiĝinte pri tio ĉe esperantisto, ni eksciis ke Fidel persone malpermesis, ke oni kie ajn montru lian portreton, kvankam li estas de ĉiu tre amata kaj admirata. En Kubo oni vidas nur bildojn de murditaj revoluciuloj kiel de Che Guevara, Camil Cienfuegos, Abel Santa Maria kaj de Jossé Marti. En multaj domoj oni vidas la buston de Jossé Marti, la fundamentisto de la Kuba revolucio, kiu falis en 1895 en batalo kontraŭ la hispanaj subpremantoj. Li estis instruisto, filozofo kaj samtempe aktiva batalanto por la libereco de sia popolo. Nun oni nomas lin „nia apostolo“ kaj „nia instruanto“.

En nia grupo troviĝis du junaj homoj, i. a. nia vojaĝgvidistino, kiu tre bone konas Latinamerikon, kie ili vivis tutan jaron por studi. Ili post la studo vojaĝis tra la tuta kontinento.

Kiam mi informiĝis ĉe ili, kio estas la diferenco inter Kubo kaj la ceteraj landoj de Latinameriko, laŭ ilia vidpunkto, ilia respondo estis: tiel granda, kiel inter tago kaj nokto, ĉar en tiuj landoj ekzistas unuflanke granda riĉeco de nur maldika tavolo de la popolo, dum aliflanke en la granda popolamaso regas nepriskribebla mizerego, ĉar mankas por ili laboro, eĉ ofte manĝaĵo, mankas instruado (ĉar estas nepagebla) kaj medicina prizorgado (same nepagebla). Kompreneble mi jam sciis pri tio, tamen estis interese aŭdi tion el la buŝo de homoj, kiuj konas la situacion el propra sperto kaj do pli bone povas kompari ol ni, kiuj ankoraŭ ne vizitis tiujn landojn.

La butikoj estas ankoraŭ ŝpareme provizataj kaj preskaŭ ĉio estas distribuata per kuponoj, eĉ sukero kaj tabako. Entute oni povas diri, ke ĉio, kion ili havas, estas honeste dividata inter la popolo. La manko pri multaj aĵoj estas kaŭzata de la usona kaj okcident-eŭropa bojkotado kaj blokado. En la havenoj oni vidas preskaŭ ekskluzive nur sovetajn kargoŝipojn. Neniun okcident-eŭropan ŝipon ni vidis tie.

Lastatempe oni skribas en la nederlanda progresema gazetaro pri bakteriologia milito, farata de Usono kontraŭ Kubo. Montriĝas, ke danĝeraj malsanoj inter la tabako, sukerkano kaj bovaro disvastiĝas en la provinco Guantánamo, kie la usonaj imperiistoj tenas sian militbazon. La multmilionna homamasego, kiu antaŭ nelonge furioze demonstraciis kontraŭ la krima usona politiko, montris kiel pretaj la tieaj homoj estas por defendi sian revolucion. Eĉ la franca kaj usona televidgrupoj, kiuj hazarde ĉeestis tiujn enormajn demonstraciojn, ne povis ne diri, ke tutcerte la plej granda amaso de la kuba popolo arde subtenas la nunan kuban registaron.

Kvankam ĉiu homo en Kubo nun havas tegmenton super sia kapo, la domsituacio estas ankoraŭ malbona, precipe en la kamparo. Tamen oni jam sukcesis forigi la tiel nomatajn bohiojn (hispane: bohios), t. e. kabanaĉoj el palmoligno kun palmfolia aŭ sukerkana tegmento kaj kun tera „planko“. Nun en la vilaĝoj oni vidas nur ŝtonajn domojn kun tegola aŭ sukerkana tegmento kaj kun ŝtona planko. Oni nun disponas ankaŭ pri elektra kurento, bona trinkakvo, oni havas sian poliklinikon kaj elementan lernejon. Sekve de tio la vivo ĉie ajn, eĉ en la plej foraj lokoj, funde ŝanĝiĝis. Tiel ekzemple la infanmortado malkreskis ĝis eŭropa nivelo kaj estas eĉ pli malalta ol en Francio! Ni komparu tion kun la ĵus liberiginta Nikaragvo aŭ kun El Salvadoro, kie 50% el ĉiuj infanoj sub la 5a jaraĝo mortas! Antaŭ 20 jaroj en Kubo regis la sama situacio. Nun en Kubo estas pli da kuracistoj ol ekzemple en Nederlando (unu je 1000 kontraŭ unu je 1200 en nia lando).

Dum unu vespero nia grupo estis akceptita en la domo de la t. n. ICAP — Kuba Instituto por Amikeco inter la Popoloj. Ni estis tie tre amike akceptitaj kaj ni havis vere tre interesan interparolon kun iu funkciulo en la domo, al kiu ni rajtis direkti ĉiajn demandojn, ankaŭ politikajn.

En nia grupo troviĝis ses junaj homoj, el kiuj kvar estis ĝisostaj anti-sovetiistoj, sed kiuj tamen tre admiris la atingaĵojn de la kuba popolo. Ili faris precipe anti-sovetajn demandojn, ekz. pri la, laŭ ili, nova dependeco de Soveta Unio, ke „la rusoj neniam helpas sen suĉi profiton el tio“ kaj aliajn similajn demandojn. La kubano respondis jene: „Ni, kubanoj, havas multajn spertojn pri imperiismo, kaj tre bone sentas, kiuj estas niaj amikoj kaj kiuj — niaj malamikoj, Tre amaraj estas niaj spertoj, precipe kun nia potenco kaj tre danĝera malamiko apud nia pordo kaj eĉ en nia domo (Guantánamo). Ni scias, kiel teni ekster nia pordo tre potencon kaj malican malamikon, kiu troviĝas apud ni, kaj vi ne maltrankviliĝu, ke ni ne scias kiel teni ekster nia domo eventualan malamikon, kiu troviĝas pli ol dek mil kilometrojn for de ni. Tamen niaj spertoj kun USSR estas tute aliaj. Ĝi kaj ankaŭ la aliaj socialismaj landoj sendas al ni siajn plej bonajn specialistojn. Ĉiutage ni ricevas ricevas de ili milionojn da dolaroj. Kaj kion ili ricevas rekompence? Nenion krom nian amikecon!

Antaŭ dudek jaroj ĉio ĉi tie estis en la manoj de usonaj kapitalistoj. Nun ĉio estas en niaj manoj. La sovetianoj, kiuj helpas nin, neniam diras: vi faru tiel kaj tiel. Sed ĉiam demandas, kion vi bezonas, kiel ni povas plej bone helpi al vi, kaj la planojn ni faras en komuna interkonsento. Kompreneble, kapitalistoj ne povas kaj ne volas kompreni tion. Ili faras ĉion, por eltiri el tio profiton. Vi rigardu la politikon ĉe

la t. n. Monda Banko aŭ de la Internacia Mona Fonduso, kiel ili diktas kaj ordonas, antaŭ ol doni „helpon“ (Portugaliao!!).

Dum nia 2500-kilometra ekskurso tra la lando, ni vizitis ankaŭ la agrikulturan kooperativon Yaya. Kooperativoj funkcias kaj estis fonditaj laŭ propra volo de la agrikulturistoj mem. 15% el la agrikulturado ankoraŭ funkcias en tute privataj entreprenetoj. Yaya fariĝis modelo por la tuta lando. Per libervolaj fortoj, helpataj de grupo da fakuloj, oni konstruis tutan kvartalon da bonaj domoj, kies antaŭfabrikatajn panelojn liveris granda fabriko de konstruelementoj liverita de Soveta Unio. La domoj enhavas ĉiun modernan komforton, kvankam ili estas modeste ekipitaj, sed laŭ kubaj mezuroj, ili estas ekzemploj por la tuta lando. La domoj enhavas elektran lumon, fluantan trinkakvon, fridujon, duŝon kaj eĉ televidilon. La baza meblaro apartenas al la domo por eviti, ke la homoj kunportu el siaj mizeraj bohioj siajn meblaĉojn. La loĝado estas senpaga, ĉar la domoj apartenas al la kooperativo, kie la homoj laboras. Ni estis en la domo de melkistino, kiu ĵus estis reveninta de sia laboro kaj ni rajtis rigardi ĉion ajn, eĉ la necesejon. Ĉio purege aspektis.

Tri personoj el nia grupo estis en Kubo jam antaŭ sep jaroj, kiam estis komenciĝinta la turismo, kiam entute mankis hoteloj, apenaŭ estis vojoj. Ili miregis pri la nuna situacio, kiu montris grandegan progreson pri ĉio ajn.

heroldo de paco

La 15an de novembro 1670 mortis en la nederlanda urbo Amsterdamo ĉeĥa filozofo, teologo, verkisto, historiisto, politikisto kaj pedagogia reformanto Johano Amos Komenio (ĉeĥe Komenický, latine Comenius). Lia verko pedagogia estas mondkonata. La jaro 1970, kiam pasis la 300a datreveno de lia motro, estis proklamita far UNO „Jaro de Internacia Edukado“. Komenio proponis uzadon de artefarita simpla lingvo kaj mem provis ĝin krei sur bazo de la lingvo latina, en sia verko „Panglottia“.

Komenio travivis zorgoplenan vivon. La milito elpelis lin el lia hejmo eksterlanden kaj pelis lin de loko al loko.

Li naskiĝis la 22an de marto 1592, eble en la sudmoravia vilaĝo Nivnice. Nur 12-jara, en 1604, li plene orfiĝis kaj estis edukata de onklo en proksima urbeto Strážnice. Tiu ĉi urbeto estis elrabita kaj bruligita far la hungaraj trupoj de István Bocskay. Post kvar jaroj, en 1608 li komencis studi la pli altan lernejon en Prerov,

kaj en 1611 foriris en Germanion. Tie li pasigis tri jarojn studante en la universitatoj en Herborn kaj Heidelberg, vizitis poste Amsterdamon kaj en 1614 revenis Moravion. Li fariĝis instruisto (1614) kaj pastro de la Ĉeĥfrata unuiĝo (t. e. eklezio de ĉeĥaj protestantoj — 1616). Du jarojn poste li ricevis funkcion de administranto de la Ĉeĥfrata unuiĝo en Fulnek kaj tie Komenio edziĝis. La eklezioj de protestantoj estis en tiu tempo jam persekutataj.

Persekutite li vagis de urbo al urbo, de lando al lando. Li instruis nobelan junularon en gimnazio, verkis konsiderojn pri porjunularaj lernolibroj, abunde verkis.

Ankaŭ hungaroj interesiĝis pri lia laboro kaj en la jaro 1650 li foriris en urbon Sárospatak (ĉeĥe kaj slovake Blatny Potok) ĉe rivero Bodrog, kie li krom aliaj verkoj skribis la librojn „Lernejo per ludo“, „Mondo en bildoj“, „Reguloj de konduto“, „Feliĉo de nacio“. Post tio li denove vivis en Leszno, Szczecin kaj Hamburgo.

En 1965 li transloĝigis en Amsterdamon kaj vivis tie relative trankvile ĝis sia morto, senĉese verkante librojn didaktikajn, teologiajn kaj etikajn. Entombigita li estis en Naarden la 22an de novembro 1670.

Johano Amos Komenio vidis la terurojn de la Tridekjara milito, kun aliaj pastroj de la Ĉeffrata unuiĝo ili estis persekutataj kiel ĉasbestaro. La riĉaĵoj de la lando estis rabataj, la bienoj okupataj far fremdaj aventuruloj, la popolo perforte katoligata.

Komenio konkludas, ke ĉiuj malbonoj kaj morala mizero fontas en tio, ke ne ekzistas sufiĉe da homa konsciiĝo, ne ekzistas unueco en pensado kaj sentado. Antaŭ ĉio necesas prepari la grundon por nova aranĝo de la homaj aferoj per klerigado de multnombraj tavoloj de ĉiuj nacioj, ankaŭ de tiuj, kiuj nun estas sur malalta ŝtupo, kaj per striktaj tuthomaraj kontaktoj. Tio estis substanco de grandioza plano de la sepvoluma verko „Generala konsulto pri la rebonigo de la homaj aferoj“, kiun la aŭtoro verkis dum multe da jaroj. Ĝi estis verkita latine kiel plimulto da verkoj de Komenio, ĉar la latina lingvo estis tiam interkompreniga lingvo de kleruloj en ĉiuj nacioj.

Unu el la plej interesaj propedeŭtikaj verkoj estas lia entuziasma libro „Vojo de lumo“, latine verkita (sub titolo *Via lucis*) dum lia restado en Londono. Jam en ĝi Komenio proponas organizi komitaton de kleruloj el diversaj nacioj, kiu dediĉus sin al disvastigado de la progreso kaj de la ĝenerala klerigado. Ĝis nun, laŭ li, kontaktiĝadis nur proksimaj najbaroj kaj samkredanoj; sed „malgrandanima kaj sekteca spiritmalvasteco estas malamiko de ĝenerala feliĉo, ĉar ĝi volas akapari sian kreskon el alies detruo“.

Ankaŭ en la eminenta verko „La plej nova lingvometodo“, kies signifo estas multe pli ampleksa ol indikas la konciza titolo, oni legas klarigojn pri tio, kiel celi al la tutmonda interkompreniĝo.

El la sepvoluma „Generala konsulto pri rebonigo de la homaj aferoj“ eldonis Komenio mem nur la du unuajn volumojn, kiam li vivis en Nederlando dum la lastaj vivojaroj. Sur la mortolito Komenio devoligis siajn filon kaj unu lernanton, Kristian Nigrin, ke ili orde aranĝu la restintajn manuskriptojn kaj eldonu ilin. Nigrin laboris dek jarojn en Londono kaj poste en Amsterdamo, aranĝante la manuskriptojn, li ankaŭ eldonis iujn librojn el la postlasaĵo de Komenio, sed li ne eldonis la kvin restantajn volumojn de „Generala konsulto“. Nur en la lastaj jaroj antaŭ la dua mondmilito oni malkovris la manuskriptojn en Halle an der Saale. Ili ampleksas pli ol 2000 grandajn foliojn.

Tiuj ĉi verkoj, savitaj el la polvo de la provinca germana biblioteko, donas ne unu interesajn pri Komenio, la plej eminenta ĉeĥa personeco de la 17a jarcento. Ili enhavas multe da rimarkindaĵoj el la nuna vidpunkto. La pli bonan mondordon apogas Komenio en sia Ĉionplibonigo (Panorthosia) je fondo de nova filozofio,

je tolerema religio, enhavanta malmultajn dogmojn, kaj je nova politiko. La novan pensadon oni disvastigu tra la mondo per nova, tre simpligita interkompreniga lingvo anstataŭ la tiam internacia latino. Ni estas fratoj ankaŭ kun barbaraj nacioj, sed pro la lingva malsameco ni ne povas facile kontakti reciproke.

La Tridekjara milito tre dezertigis, senhomigis kaj por longa tempo malkonstruis grandan parton de Eŭropo. Komenio meditas, kiel konstrui la novan, pli bonan mondon sur la ruinoj de la malnova. La kleruloj esploru la verojn kaj disvastigu ilin per lernejoj. La pastroj varmigu la homajn korojn en la preĝejoj. La plejgrava tasko de politikistoj estas, fortostreĉe labori por konservado de la paco.

Por tiuj ĉi taskoj oni organizu tri tutmondajn asembleojn. La asembleo de la lumo, siaspeca plej alta kultura konsilantaro, zorgus ekzemple pri progreso de sciencoj kaj inventoj, ĝi inspektus la presistojn kaj perfektigadon de lernejsistemo kaj de instrumentoj, unuavice eldonadon de libroj. Neniu eldonados librojn laŭ sia arbitro, sed nur tion, kion la publika aŭtoritato taskos al li.

La plej alta asembleo de delegitoj, kiun li nomas la paca tribunalo, devus gardi, ke nenie nacio ataku alian nacion, ke neniu, predikanta militon kaj intruanta armilfabrikadon, kuraĝu agi. Kaj ĉi tiu asembleo kaj lokaj organoj havus ankaŭ multajn ekonomiajn kaj aliajn taskojn. Oni povas legi ankaŭ interesajn aludojn pri komuna nutrado kaj opinion, ke oni forigu monopolojn en la tuta mondo: monopoloj estas malhonoro de la jarcento. Ne estas tolereble, ke unusola homo amasigu sur sin taskojn, kiujn povus plenumi pli multe da homoj. Ĉio estu komuna, sed oni zorgu pri ordo kiel inter fratoj. Tiel do sktribis Komenio antaŭ pli ol 300 jaroj en Amsterdamo, en la tempo de impete disvolviĝanta komerca kapitalismo.

En la plej ĝeneralan asembleon, en la tutmondan konsilion, oni devus inviti la plej bonajn homojn el la tuta mondo. Konsekvenca propagando pri paco devas esti rimedo por forigi kiel preman malcertecon, tiel malbonekscesojn. La savan lumon de la paco oni disvastigu el Eŭropo en ĉiujn aliajn mondpartojn. Oni forigu ĉiujn makiavelajn principojn, ŝarĝoj de la pololoj estu moderigitaj, kaj fine venos paradizo kaj trankvilo en la mondon.

Bedaŭrinde, ĉiuj tiuj ĉi revoj restis nur en manuskriptoj.

Adolf Staňura

La redakcio de „Paco“ gratulas ĉiujn siajn legantojn — pacbatalantojn okaze de la Nova Jaro kun bondeziroj pri persona bonfarto, feliĉo kaj sukcesoj en la brava batalo por paco kaj trankvila vivo.

LA VERO PRI VJETNAMAJ- ĈINAJ RILATOJ DUM TRIDEK LASTAJ JAROJ

La freneza kampanjo de malamego, mensogoj, kalumnioj kaj minacoj de la imperiistoj kontraŭ ĉiuj landoj kaj movadoj, kiuj malakceptas la „legon“ de la plurnaciaj trustoj, ne evitas Vjetnamion. Kulmino de malnoblegeco: la krimuloj furiozas kontraŭ sia viktimo, al kiu ili trudis 30 jarojn de la plej malpura kaj barbara milito. Kaj ili eĉ trovis novan aliancanon por fari ilian fian laboraĉon: la nunajn ĉinajn regantojn. . .

Kalumnio kuniras kun silento pri ĝenaj faktoj. Miaj samlandanoj, ekzemple, aŭdis 100-foje kaj eĉ pli, ke Vjetnamio estas en Sudorienta Azio la instrumento de hegemoniista politiko de Sovetunio, sed oni zorge kaŝas de ili la longan ĉenon de fiagoj kontraŭ Vjetnamio fare de la ĉinaj reakciuloj. Tamen la fakta alianco de la imperiismo kun Ĉinio povas nur vekti misfidon ĉe la popoloj. Kontraŭ tio, tiuj sinjoroj posedas nur unu armilon: la mensogon, kun la espero ke, 100-foje redirata, ĝi povos aspekti kiel vero!

Oni tamen devas scii ke la vero pri granda Ĉinio, vasaliganta vastegajn teritoriojn en Azio, ne estas nova. La miljaraj antaŭuloj de la nunaj ĉinaj regantoj, la estroj de la „Ĉiela Imperio“ jam agadis konforme al tiu hegemoniista revo. (Ĉu necesas rimarkigi, ke tiam USSR ne ekzistis?) kaj Maŭ Zedong laŭte faris la saman revon jam en 1939! Unu el la plej urĝaj taskoj de la pacdefendantoj ĝuste estas diskonigi la veron pri la rolo de nuntempa Ĉinio kaj pri la problemoj de Sudorienta Azio. Defendo de la paco postulas la defendon de la hindĉinaj popoloj rekte minacataj de la ĉina hegemoniismo. Nura babilado pri paco, rifuzanta vidi la realajn eventojn kaj kondamni la militintrigojn, povas nur servi tiujn lastajn. Ni ne forgesu Munkenon!

Nu, post la libro „KAMPUCIO“ (recenzita en „Paco“ n-ro 4/1980), tute logike kaj necese venas nova titolo el „*Fremdlingva eldonejo*“ en Hanojo: „*La vero pri la Vjetnamaj-Ĉinaj rilatoj dum 30 lastaj jarcj*“. Libro, kiu detale montras kion volas kaj kiel agadas Pekino, apogante sin sur nerefuteblaj dokumentoj. Vjetnamio certe estas la ĉefa obstaklo kontraŭ ĝia ekspansiema politiko, sed ĉiuj najbaroj de Ĉinio estas minacataj, ĉar konsiderataj, tute aŭ parte, kiel ĉinaj teritorioj.

Ni estu dankaj al niaj vjetnamaj amikoj, kiuj ĝustatempe tradukis tiun verkon, ĉar ĝi permesas malfermi multajn okulojn. Tio estas grava kontribuo al la defendo de la paco, ne nur en Azio, sed ankaŭ en Eŭropo kaj en la tuta mondo, ĉar pli kaj pli evidenta estas tio, ke ĉiuj reakciaj fortoj en la mondo provas konstrui grandan aliancon kontraŭ la progresemaj fortoj sur nia planedo. Pro tio, karaj legantoj, mi aŭdacas konsili al vi nepre mendi tiun libron. Nepre ĝin legu, legigu, diskonigu kaj eĉ eventuale traduku!

re cen zoj

Neniu ekzemplero restu sur la bretoj de niaj libroservoj!

(Oni povas sin turni notinde al la libroservoj de „Fédération espérantiste du Travail“, 179 rue Ordener, 75018 PARIZO, al la libroservo de la hispana MEM-sekcio kaj al Esperantistaj Asocioj en socialismaj landoj, kiuj informos pri la prezo).

W. G.

D. Blanke (red.), Soci-politikaj aspektoj de la Esperanto-Movado. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt 1978 paĝoj 222, nederlandaj guldenoj 13,80

Homo, kiu konas la Esperanto-movadon en socialismaj kaj en kapitalismaj landoj, ne povas nei, ke nenie en okcidenta Eŭropo oni trovas la nombran forton de la bulgara movado, la kulturan kaj eldonan vigecon de la hungara movado, la organizitecon de la movado en GDR, la efikon al la publiko de la pola movado aŭ la imponon de la soveta movado.

Certe ĉe ni ĉiu ajn esperantisto rajtas fondi novan mond-savan organizon, eldiri siajn personajn cerbumaĵojn kaj veturi al Esperanto-kongreso en Brazilo (se li nur havas monon por tio), kaj el tio oni povus konkludi, ke

ĉi tie ekzistas pli granda idea viglo. Miaopinie temas nur pri sintrompo, ĉar el nia absoluta, anarĥia agadlibereco rezultas nur malmulta efiko al la ĉirkaŭanta socio, kaj cetere homoj, kiuj en la okcidento klopodis enkadrigi Esperanton en pli vastan sacion, renkontis nur nekomprenon kaj akuzojn pri „komunisteco“. Ja la ĉefa valoro de la Esperanto-movado por multaj okcidentanoj kuŝas en kontentigo de siaj individuaj bezonoj.

Tio estas ege danĝera por tamen batalanta movado, kiam la gvidantoj mem de la movado je ĉiu nivelo ne povas klare analizi la ĉirkaŭan socion kaj vidi la lokon de Esperanto en ĝi.

Grandan helpon en tiu direkto donas la recenzata verko, en kiu ses elstaraj Esperanto-agantoj (A. Ratkai, S. N. Podkaminer, D. Blanke, U. Lins, E. K. Drezen, M. I. Isaev) analizas plurajn sociopolitikajn aspektojn de la movado por internacia planlingvo. Iliaj studoj kovras vastan kampon: de la personeco de Zamenhof ĝis bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko, de similecoj inter la movado por Volapuko kaj la movado por Esperanto ĝis reprimado de la signifo de la „interna ideo“. Se ekzistus ĉe ni lernejoj por gvidantoj, ĉi tiu verko certe estus unu el la lernolibroj. Ĉu estas tro granda postulo la peto, ke ĉiu nuntempa aŭ potenciala grupgvidanto legu ĝin?

Tio neniel signifas, ke la ideoj esprimataj de la verkintoj estas rigardindaj kiel dogmaj veroj, kaj laŭ mi jen kaj jen ili estas kritikeblaj ankaŭ el maldekstraj pozicioj, sed certe ili estas rimarkinda kontribuo al kono de la vero pri ni mem (kaj la vero estas ĉiam revolucia, laŭ konata esprimo).

Renato Corsett

kores. pondemuloj

Bulgario

F-ino Bistra Dojĉinova — 1233 Sofia, Kavala bl. 42 D, ap. 95 — pri turismo, BK, prosp. kol. aforismojn

F-ino Neli Vezenkova — 5400 Sevlievo, kv. „Fridriĥ Engels“, bl. 7 B, ap. 29

Pollando

Jerzy Posłuszny — 50-952 Wrocław, 17, pk 1629 — tm. interŝ. E-librojn, E-gramofondiskojn kaj sonbendojn, E-pmk, E-glumark. kaj insignojn, E-gazetojn kaj aliajn esperantaĵojn.

USSR

Naum Kovnators — Daugavpils, 228401 Latvio, Do vostrebovanija — 23 j. instruisto de lingvoj, tm, ĉt, pre-

cipe pri muziko, arto, historio, vojaĝoj, lingvoj.

S-ino Nadeĵda Nikolajĉenko — 334900 Krasnoperekopsk, Krimskaja obl., str. Kalinina 7—17 — 29-jara ĉefaparattistino en soda uzino — kun samaĝuloj el ĉl, pri ĉt.

Aleksandr Ivanov — 644066, Omsk 66, str. Krasnij putj 139 A, ap. 24 — ĉl, ĉt. Respondo certa.

Aleksandr Denĉik — 312330 s. Krisino, obl. Harkovskaja, r. Bogoduhovskij — 14-j. lernanto, pri ĉt kun Bulgario, Pollando k. a.

Jugov G. J. — 220050 Minsk, Do vostrebovanija — ĉt, ĉl.

Esperanto-klubo serĉas kontaktojn kun samideanoj tutmonde. Skribu al: 281900 Kameneĉ — Podolskij, ul. Ĉkalova 3.

**REDAKTA KOMITATO**

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguyen Hai Trung (Vjetnamio)
Boleslaw Staszczak (Pollando)
 Lingva revizio: **Asen Grigorov** (Bulgario)
 Arta aranĝo: **Kiril Drajev** (Bulgario)

La redakcio atendas kontribuojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabavka 1 v. hod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI Népköztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA, K-9, USSR

Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio

Generala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zuôtô-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bul. Emil Markov, blok 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, kv. Emil Markov, PK 66, 1404 SOFIA, Bulgario

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario

Centra kasisto (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen 102-45 P.)

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.

KIE ABONI?

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld, 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN. AŭS. 100.

Belgio: Glady Claude, 21 Rue Kessels, 1030 BRUSSEL.

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN 11, OPF. £ 4.

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bul. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levo

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 110 00 PRAHA I. 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRH. 35 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN. 20 DM.

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-65, 01610 VANTAA 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle. BP 23 F-545110 Tomblaine 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60 108 BERLIN 10 DM

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona)

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 35 for.

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakura gao-ka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino López, Havana Esp. -Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA I.

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad N-3155 TOROD.

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugalio: Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, R/C A-LISBOA 350 eskudo

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11, R-1900 TIMIȘOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1, 80 rubloj.

Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6. 50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bul. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.